



ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

majo-junio 91

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefono: 01/53 77 13

3/91

Impresoj pri la ĝenerala kunveno SES kaj la semajnfina aranĝo en Luzern, 23./24.3.1991.

Sabate la 23-an de marto ekde la 12.00 h iom post iom kolektiĝis multnombra grupo de membroj. La komenco estis bongusta tagmanĝo en hotelo METROPOL-MONOPOL apud la stacidomo. En tre agrabla atmosfero ni komencis la semajnfinan renkontiĝon.

Je la 14.00 h la prezidanto povis bonvenigi proksimume 40-on de partoprenantoj. La ĝenerala kunveno komenciĝis akurate. La laŭstata tagordo flue pasis. La protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno, la prezidanta raporto, la kasraporto kaj la raporto de la kaskontrolantoj ĉiuvoĉe apropiĝis. Ankaŭ la elektoj glate pasis, ĉar la komitatanoj kaj la kaskontrolantoj konsentis daŭrigi. En la tuta kunveno oni sentis harmonion kaj amikecon. Post la antaŭvidita tempo la prezidanto povis fini la agrablan ĝeneralan kunvenon 1991 je la 16.00 h.

Ekde la 16.30 h la plua programo komenciĝis laŭ plano: La akcepto de gazetaro-representantoj, la lingvaj lecionoj por komencantoj kaj progresantoj rikoltis bonan ehon, kiel mi povis konstati.

En la salono de la ĝenerala kunveno Claude Gacand prezentis imponan elekton de libroj. Post la 17.30 h oni ekpromenis tra malnova urbo parto al hotelo Rütli, kie atendis nin bongustaj manĝaĵoj. En la longa listo ĉiu ĉeestanto trovis ion apartan. Mi mem elektis lento-kuketojn kun hinda legomo. Tre bongusta manĝo, sed la eta ruĝa io nomita "ĉili" senkompate atakis min kaj eligis eĉ larmojn je la ĝojo de tiuj, kiuj rimarkis tion!

En la sama loko okazis ankaŭ la amuza parto. Paul Scherer (la LES-prezidanto) prezentis be-

lan akordionan muzikon kaj akompanis ankaŭ tri kantistinojn. Alterne ankaŭ la tuta ĉeestantaro kune kantis. Menciinde estas ankaŭ la libro-konkurso prezentita de la prezidanto.

Post la 22.00 h tiuj, kiuj anoncis sin por tranokto estis aŭtomobile transportitaj al la hotelo "SONNENBERG" en Kriens.

Ho! Kio atendis nin tie? Bela, agrabla hotelo situita en alteco de 682 metroj, kun mirinda panoramo. De nia ĉambro ni havis antaŭ ni sur la balkono rondvidan panoramon de preskaŭ 350 gradoj. Plurfoje ni ĝuis la mirinde lumigitan regionon.

Post profunda dormo atendis nin bongusta matenmanĝo. En agrabla diskutado la tempo tro rapide pasis.

Tre akurate je la 10.00 h Angelo Mellini aperis per buseto kaj Paul Scherer venis per la privata aŭto por veturigi nin al la hotelo SCHWEIZERHOF, kie okazis prelego pri Tolstoj, kiu loĝis en la jaro 1857 en tiu-ĉi domo. Parolis tre interese Andy Künzli pri la favoriga sinteno de Leo Tolstoj al Esperanto kaj precipe kiel Tolstoj vidis Luzern kaj la enloĝantojn. Oni estus povinta ankoraŭ longe aŭskulti pri tiuj historiaj okazaĵoj. Por fini la semajnfinan renkontiĝon okazis gvidado tra la hotelo kaj al la ĉambro en kiu siatempe Tolstoj loĝis.

Resuma rezulto: Ĉio estis bonege organizita. La Lucerna Esperantogrupo meritas grandan dankon kaj sinceran komplimenton.

Kun bonegaj impresoj ni forlasis la ĉi-jaran lokon de la SES-ĝenerala kunveno kaj la semajnfina renkontiĝo. -FL-

* * *

Specialaj informoj:

Dimanĉon 2-an de junio: Vevey, Hôtel de famille, renkontiĝo kun Erich-Dieter Krause. Interesatoj vidu la aldonan informilon.

Vi sciu, ke sabaton 1-an de junio ni aranĝos vojaĝon en la montaro Juraso.

Lundon 3-an de junio, la matenon mi vizitigos CDELI-n kaj KCE-n al gesinjoroj Krause, kaj posttagmeze mi intervjos ilin en SVISA RADIO INTERNACIA en Berno. -CD-

* * *

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

ĜENERALA KUNVENO 1991

LUCERNO

PROTOKOLO

Kvardeko da personoj partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de Svisa Esperanto-Societo la 23an de marto 1991, 14h00-16h00, en hotelo Metropole & Monopol, Lucerno. (La listo de partoprenantoj kaj senkulpigantoj estas konsultebla ĉe la sekretario de SES). Sekvas la resumo de la esencaj kontribuoj.

Tagordo

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno

Sen esencaj komentoj oni unuanime akceptas la protokolon de la Ĝenerala Kunveno en 1990.

b) Raporto de la Centra Komitato

La raporto estis publikigita per la informilo 'SES informas', marto 1991. SES-prezidanto Claude **Gacond** (La Chaux-de-Fonds) atentigas, ke la pasinta jaro ne estis facila por SES. Precipe daŭre estas tro malmulte da SES-membroj - nome nur preskaŭ 200 - por havi ĉiumonatan revuon. Heinrich **Ringli** (Basel) ŝatus scii kiom da membroj pagis la kotizon en 1990 kaj 1991. SES-kasisto Ernst **von May** (Oberuzwil): 133 en 1990. D-ro Giorgio **Silfer** (Milano/La Chaux-de-Fonds), reprezentanto de Kooperativo de Literatura Foiro, salutas nome de sia organizaĵo kaj memorigas, ke ĝi havas sian sidejon en la 700-jara Svislando. La revuo 'Literatura Foiro' aperos en 1991 kun la aŭspicio de SES kaj dissendiĝos inkluzive en la SES-kotizo al ĉiuj SES-membroj. Parto de la enhavo de LF estos dediĉita al svisaj temoj. Tial ke 'Svisa Esperanto-Revuo' por la momento ne plu aperos, ĉar oni ne trovis redaktoron, LF servos kiel kultura revuo por la SES-anoj. Aliflanke, SES-vicprezidanto Fritz **Liechti** (Zürich) prezentas sian projekton: li transprenos la taskojn rilate la primovadan informfluon, redaktante la informilon 'SES-informas'. Li alvokas ĉiujn e-grupojn en Svislando kontribui per informoj. Ernst **Glättli** (Brugg) esprimas sian feliĉon koncerne la

gazetajn iniciatojn. Stanislav **Pochanke** (Wil) ŝatus scii, ĉu la SES-kotizo sufiĉas por pagi LF. Claude **Gacond** klarigas, ke temas pri kolektiva abono, kiu estas pli moderpreza kompare kun la unuopa LF-abontarifo. SES-sekretario Andy **Künzli** (Kriens) alvokas la ricevontojn de LF senantaŭjuĝe aliri al LF, kiu kelkfoje ŝajnas fortimigi la esperantistojn pro troa eliteco. Li vidas en la altnivela LF precipe lingve kaj kulture klerigan valoron kaj taŭgan (provizoran) solvon de la gazetproblemo de SES. Claude **Gacond** emfazas, ke LF estas kaj svisa kaj eŭropa kaj tutmonda. Niklaus **Weiss** (Zug) ŝatus kiel UEA-ĉefdelegito por Svislando firmigi sian kontakton kun la svisaj esperantistoj. Koncerne la 'heredaĵon Allschwang' estas deziro informiĝi. Claude **Gacond** klarigas, ke la mortintino estis esperantistino, kiu heredigis sian monon al aro da filantropaj organizaĵoj, inter alie al la esperanto-movado en Svislando. Post komplika hereda procezo SES ricevis sian parton de tiu heredaĵo. Dum aliaj hered-organizaĵoj ne pagis imposton, SES devis pagi 30%, lige kun ĝia jura nenormala statuso; tiu ĉi problemo devas esti urĝe solvita. Koncerne la gazetaran servon Argus, Ernst **Glättli** demandas sin, ĉu la kostoj de tiu servo pravigas la rezulton. Andy **Künzli** respondas, ke la gazeteltranĉaĵoj, kiujn sendas Argus, estas ne nur utilaj por eventuala refuto de kontraŭesperantaj artikoloj, sed ankaŭ por ilia arkivigo cele al estonta verkado de kroniko pri la e-vivo en Svislando. La jarraporto de la Centra Komitato estas akceptita per 23 poraj voĉoj.

c) Financa raporto

Paul **Scherer** (Emmenbrücke) ŝatus koni la detalajn elspezojn rezultintajn el propagando, varbado, perkoresponda kurso. Ernst **von May** ne diponas nun pri la detalaj dokumentoj. Oni povus havigi tiujn detalojn nur surbaze de la fakturoj. Claude **Gacond** aldonas, ke ekzemple la artikolo de Fritz Wassmann en la svisa porinstruista gazeto estas propagando. Oni diskutas pri la demando, ĉu la perkoresponda kurso estu senpaga aŭ ne. Laŭ Verena **Chaves-Walder** (Flawil) la PKK-laboro devus esti pagota. Claude **Gacond** ne postulas salajron, sed fakturigas la paperon al SES. Li diras ankaŭ, ke pli kaj pli SES (kaj ne KCE) devas zorgi pri la poresperanta propagando en Svislando. Franz **Brügger** (Emmenbrücke) opinias, ke eĉ se Claude Gacond ne postulas salajron, la kurso estas tro kosta, kaj sugestas disdonon de la PKK-materialo al la regionoj. Claude **Gacond** respondas, ke ne estas sufiĉe da

fortoj en la regionoj por tio kaj sugestas detale diskuti en laborgrupoj. Heinrich **Ringli** frapas la buĝetitan perdon de CHF 5600.- por 1991. Claude **Gacond** alvokas agi, kontribui, mondonaci. En kazo de neceso eblas kovri ĝin per la heredaĵo Allschwang. Dum la jaro mankas efika propagando. Ĉio dependas de SES, ĉu ĝi kapablas forigi la minuson. SES havas apenaŭ 200 membrojn. Laŭ Andy **Künzli** la societo devus elspezi, se ĝi volas ekzisti; sen elspezoj ĝi simple mortas. Oni havu komprenemon por nia nefacila kaj nesalajrita laboro kaj bonvolu apogi ĝin. Por Ernst **Glättli** tamen estas grave teni racian kaj sanan librotendon kaj ekvilibron. La heredaĵo Allschwang ne eltenas eterne. Oni vidu post unu jaro. Ankaŭ Heinrich **Ringli** ne toleras deficiton. Oni akceptas la laboron de la kasisto per 29 poraj voĉoj.

ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj

Akceptita per 29 poraj voĉoj.

d) Raporto de la komisionoj

Ne estas traktita pro manko de tagorderoj.

e) Elektaj (prezidanto, du pliaj komitatanoj, kaskontrolantoj, komisionanoj)

La ĝisnunaj prezidanto (Claude Gacond), vicprezidanto (Fritz Liechti), sekretario (Andy Künzli) kaj kasisto (Ernst von May) estas reelektitaj por plia trijara periodo per 30 voĉoj. Kiel kaskontrolantoj funkcias Ernst Glättli, Margrit Guldin kaj Dora Hemmann, kiujn ne necesas reelekti, ĉar ili estis elektitaj pasintjare. Al ĉiuj funkcioj estas esprimita kora danko.

Krom tio oni elektas novan regionan vicprezidanton por Germanio: Angelo **Mellini** (Hermetschwil), kiu anstataŭas Didi Weidmann. La nova CK-ano estas skribe proponita de kelkaj membroj de Lucerna Esperanto-Societo.

f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro

La buĝeto por la jaro 1991 estas akceptita per 30 poraj voĉoj.

g) Proponoj

Krom la propono vicprezidantigi Angelo Mellini ne alvenis aliaj proponoj.

ĝ) Diversaĵoj

- Nicole **Margot** (Lausanne) volas informiĝi pri la stato de KCE. Claude **Gacond** klarigas, ke post kelkaj tagoj okazos kunsido de la Fonduma Konsilio de GEP. Nur tiam oni povos ekscii novaĵojn. Cetere Andy Künzli kaj Giorgio Silfer estas novaj membroj de tiu Konsilio. En 1991 okazos paŭzo rilate la kursojn en KCE. Koncerne CDELI, alvenas multe pli da materialoj ol oni sukcesas digesti.

- Paul **Scherer** petas la adresojn de personoj el Centra Svislando, kiuj sekvas la PKK-kurson.

- Andy **Künzli** anoncas, ke la CK de SES ŝatus ĉijare rekunvoki la Federan Konsilion kaj sondas, ĉu estas intereso pri tio. Ĝenerale oni konsentas. Informoj kaj invito sekvos.

Protokolis Andy E. Künzli

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

CENTRA KOMITATO

Prezidanto:

s-ro Claude **GACOND**, Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds. Tel. priv. (039) 26 52 32. Kultura Centro Esperantista: (039) 26 74 07.

Sekretario:

s-ro Andy E. **KÜNZLI**, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens. Tel. (041) 45 55 83.

Kasisto:

s-ro Ernst **VON MAY**; Flurstrasse 3, 9242 Oberuzwil. Tel. (037) 51 61 30.

Unua vicprezidanto kaj ĉefredaktoro de "SES-informas":

s-ro Fritz **LIECHTI**; Wiesliacher 17, 8053 Zürich. Tel. (01) 53 77 13.

Regionaj vicprezidantoj:

Germanlingva: s-ro Angelo **MELLINI**; Büntacher 21, 5626 Hermetschwil. Tel. (057) 33 33 85. Oficejo Lucerno: (041) 57 01 11.

Franclingva: f-ino Nicole **MARGOT**; 28, ch. Tour-Grise, 1007 Lausanne. Tel. (021) 24 11 93.

Itallingva: d-ro Tazio **CARLEVARO**; Viale Giuseppe Motta 32, 6500 Bellinzona. Tel. (092) 25 29 88.

Ceteraj komitatanoj:

s-ino Mireille **GROSJEAN-ROBERT**, 20, rue du Temple, 2426 Les Brenets. Tel. (039) 32 18 88. (Ligo kun GEP/KCE).

s-ro Ueli **HAENNI**, Wytttenbachstr. 28, 3013 Bern. Tel. (031) 42 71 56. (Junularo)

s-ro Fritz **WASSMANN**; Uettligenstr. 16A, 3033 Wohlen. Tel. 031 82 27 55. (Eksteraj rilatoj, ekologio)

Grupaj informoj:

LES/Lucerna Esperanto-Societo:

- 16.5.2015h Restoracio Simplon Habsburgstrs 16.
"Distraĵoj" Margr. kaj Paul Scherer.
27.6.20.15h Egiptujo, Persa Golfo, Hindujo,
Kamboĝo, Birmo kaj Indonezio en lum-
bildoj. D-ro Krause.

EKW/Esperantoklubo Wil:

- 8.5.20.00h en restoracio Schweizerhof Untere
Bahnhofstr.18.
"Ludvespero" perfektigado en Esperanto:
Amuzo. L. Sennhauser.
29.5.20.00h Prelego pri "restado en Azio"
Egiptujo, Persa Golfo, Hindio, Kam-
boĝo, Indonezio. D-ro Krause.

ESZ/Esperanto-Societo Zürich:

- 13.5.19.00h en Karl der Grosse. Parolos s-ro
Gacond pri:
"Intimiĝo al Ĵuraso"
10.6.19.00h Lumbildprelego pri la malproksima
Oriento. D-ro Krause.

ESBe/Esperanto-Societo Bern:

En restoracio "Al Forno" Spitalgasse 37.

- 6.5.19.30h ĉiuj kunvenoj
27.5.19.30h en la sama
3.6.19.30h supre menciita
24.6.19.30h loko.

Nova prezidanto: S-ro Daniel Ruchti Schweizer-
hubelstrasse 9 3052 Zollikofen Tel:031/57 08 65.

ESPERANTO-GRUPO "LA STELO" Genève

31.5.20.00-22.00h en Institut National Genèveis,
Promenade du Pin 1.

1. Duonhora studado en Esperanto
2. "Astrologiaj prognozaj por 1991, de
A. Stakian, kun teknikaj astronomiaj
klarigoj sekvataj de interpretado kaj
respondo al personaj demandoj.

28.6.20.00-22.00h samloke kiel supre

1. Duonhora studado en Esperanto
2. Prelego pri "SVISLANDA LITERATURO" de
niaj kvarlingvaj literaturistoj kaj
poetoj, aperintaj en la SVISA ANTOLO-
GIO, de MAD MEVO-Stakian, tradukintino
de franclingvaj poemoj.

Dankletero de la Rumana Esperanto-Movado

Altestimataj gesamideanoj -bonvolu- mi petas pardoni min pro la granda malfruo de la respondo al via letero. Mia ne tre bona farto kaj la granda nombro de leteroj, per kiu la Esperantistaro el diversaj landoj esprimis sian solidarecon al la Rumana popolo kaj al la Rumana Esperanto-Movado estas la ĉefaj kaŭzoj de tiu malfruo.

Via letero tre impresis min. Ĝi faris, ke ni ne plu sentu nin solaj, forgesitaj en tiu-ĉi mondangulo, ke apud ni estas homoj grandanimaj, pretaj nin helpi. Tion vi jam faris. Mi tre dankas al vi pro la mono kolektita [Fr.140.- 1990. Red.] Ĝi estas la sola mondonaco, kiun oni faris al nia asocio. Ni intencas utiligi ĝin por aĉeti, laŭ via intenco, aĵojn nepre bezonatajn. La plej necesa kaj urĝa por nia agado estas la akiro de ia kopiilo. Ni esperas, ke per aliaj kontribuoj ni povos kolekti la sumon necesan por tio. Bonvoldo reteni la monon ĉe vi ĝis ni sciigos vin pri la konto en kiun ĝi estu ĝirita, probable al iu okcidenta firmao. Ĉu vi povus rekomendi iun aparatsistemon aŭ aparatmarkon taŭgan por nia agado [multobligado de lecionoj, lego- aŭ lernolibretoj, informa bulteno, cirkuleroj ktp]. Pardonu min pro tiu demando, sed ĉe ni mankas tiaj informoj aŭ estas ne kompletaj. Mi mencias, ke dum la diktatereco komunisma la posedo de tiaj iloj kaj eĉ de la materialoj utiligitaj por la multobligado estis malpermesata kaj severe punata. Felice tiu nigr tempo pasis kaj nun ni povas ne nur revii sed ankaŭ realigi niajn planojn kaj pensojn. Bonvolu transdoni niajn elkorajn dankojn al viaj societanoj.

Via Prof.Dr.Aurel Boia.

* * *

- * ESPERANTOKLUBO WIL [speciala informo]
- * kune kun la E-Grupo Winterthur kaj SAEF invitas
- * al REGIONA KUNVENO, sabate la 22-an de junio 1991
- * en Winterthur. Kolektiĝo je la horo 09.46 ĉe la
- * ĉefelirejo de la stacidomo. Programo kaj aliĝo ĉe
- * s-ino G.Eggenberger Wurmbühlstr.10 8405 Winterthur.
- * Tel: 052/28 47 64.

* * *

Venonta redaktfina de SVISA ESPERANTO-SOCIETO INFORMAS estos la 14-a de junio 1991.

* * *